

Karboekspluanta Distrikto Rosice-Oslavany

Oldřich Arnošt Fischer

Kluba prelego por Esperantista Klubo Brno, filia societo de Ĉeĥa Esperanto-Asocio, la 29-an de marto 2023


*Por memoro de miaj antaŭuloj, kiuj tie laboris.
Aŭtoro*

Kompare kun aliaj karboekspluantaj distriktoj en Ĉeĥa Respubliko Karboekspluanta Distrikto Rosice-Oslavany (80×5 km) ne estas granda. Sed tiu mallarĝa permia-karbonia sulko pli longe ol 230 jarojn influis vivon de regiono kaj kontribuis al evoluo de industria urbo Brno. Fosilioj de plantoj kaj bestoj atestas pri vivo, kiu tie ekzistis antaŭ 252 milionoj – 354 milionoj da jaroj. (Paleozoika erao karbonio daŭris 56 milionojn da jaroj kaj permio 46 milionojn da jaroj.) Ĝis nun inter Padochov kaj Neslovice ekzistas Fiŝeta Roko (*Rybičková skála*), kiu enhavas marajn fosiliojn. Nia kanada samlandanino, paleontomologino Jarmila Kukulová-Peck, priskribis fosiliojn de pralibeloj el ĉirkaŭaĵo de Zbýšov apud Rosice.

Ŝtonkarbo ■, bruna karbo kaj lignito ■ en Ĉeĥa Respubliko



Minejoj ● kaj mingalerioj ▲ en la distrikto Rosice-Oslavany



Mezepokaj ministaj tradicioj de la distrikto

Primislido **Venceslao la 2-a** (1283 – 1305) rajtigis urbon Brnon ekspluati kuprajn kaj aliajn metalajn ercojn apud vilaĝo Oslavany.

En la 14-a jarcento oni ekekspluatis inter Velká Bíteš kaj Veverská Bítýška feran ercon.

En la jaro 1457 reĝo **Ladislao la 1-a Bohemia (Postmorta, Nudulo)** (1440 – 1457) konfirmis privilegion ekspluati metalajn ercojn. En la jaro 1548 imperiestro **Ferdinando la 1-a Habsburga** (1503 – 1564) eldonis novan Ordon de Jáchymov kaj konfirmis minekspluatadon en sfero 6 miloj ĉirkaŭ Brno.

Okcidente de Oslavany apud vilaĝoj Čučice kaj Ketkovice situas granda erckuŝejo de grafito. En la 19-a jarcento oni ekspluatis grafiton apud Čučice kaj vendis ĝin en briketetoj sub la nomo „Moravian-Blackeat“. En la jaro 1870 oni minadon interrompis, sed en la jaroj 1916 – 1924 kontinuus. Grafitan minejoj nomiĝis Anna, Marie kaj Vlasta (kies posedanto estis la banko Živnobanka Praha), Josef I kaj Josef II (kies posedanto estis E. Elbogen el Vieno).



„Iam grupo de vilaĝanoj volis trovi oron. En arbaro ili konstruis tendaron, unu el ili kuiris, aliaj fosis, Sed ili trovis neniun oron, nur grafiton. Pro tristo ili terure ebruis. Reveninte hejmen unu el ili elĵetis sur sterkejon ĉiujn bildetojn de sanktuloj. Bildo de Sankta Venceslao elflugis laste kaj ebria viro, kiu ĝin elĵetis, kriis: “Vi ilin kuratingos, ĉar vi sidas sur ĉevala dorso!”

Julie Chatrná (1910-2005), mia avino

Apud Nová Ves oni ekspluatis magneziton ($MgCO_3$), sed ĝi estis malpurigita per argilo. Ankaŭ tie oni ekspluatis sepioliton. Tio estas mineralo, kiu rezistas altajn temperaturojn, pro tio ĝi estis uzata por fabrikado de pipoj. Ĝia popola nomo estas “mara foamo”, ĥemia formulo: $Mg_4Si_6O_{15}(OH)_2 \cdot 6H_2O$.

En duono de la 16-a jarcento en sabloŝtonaj minejoj apud Nová Ves laboris italaj ŝtonministoj. Pro tio en Ivančice ekzistas itala nomo **Antonio di Valdi** kaj en Oslavany itala familia nomo **de Bertoni**. En karboekspluanta distrikto Rosice-Oslavany oni eksperimente ekspluatis galeniton (PbS) kaj eĉ arĝenton (Ag).

Malkovro de ŝtonkarbo

En fino de la jaro 1760 **Franz Riedl** trovis en Oslavany ŝtonkarbon. En la jaro 1769 oni lin pro tio honorigis per ora medalo de Maria Terezia. En la jaro 1781 imperiestro **Josefo la 2-a** abolis servutecon kaj eksaj servutuloj povis ŝanĝi loĝejojn, tial ili povis alveni en la distrikton (sed servuta laboro estis abolita nur en la jaro 1848). Ankoraŭ en la jaro 1783 en Moravio oni ekspluatis karbon nur en karboekspluanta distrikto Rosice-Oslavany.

La 29-an de decembro 1784 estis la unua konsiderata entreprenanto eksjezuito **Josef Jenich**.

En la jaro 1785 alvenis el Tiroloj en Oslavany sperta ministra oficisto **Johann Müller**. En valo de rivereto Balinka li fondis du minejojn kaj en la jaro li ricevis privilegion ekspluati karbon en bieno Oslavany. Li mortis en la jaro 1806.

En la jaro 1818 aĉetis minejojn inter Padochov kaj Oslavany **Anna Müllerová**, kiu kun helpo de sia filo **Antonín Müller** kontinuus laboron. Ili ankaŭ ekspluatis alunan ardezon. (Alunoj estas duoblaj sulfatoj kun K aŭ NH_4 kaj Al aŭ Cr.) El la ardezo ili fabrikis salpetron (trioskoniatojn NH_4NO_3 , $NaNO_3$, KNO_3). Oni uzis la salpetron por fabrikado de sulfura acido (ĝi estas fonto de oksigeno por oksidado de sulfura dioksido SO_2 al sulfura trioksido SO_3). En parto de Oslavany Werkhof (nuntempe Havírna) Anna Müllerová konstruigis du fornojn por kuirado de salpetro. Alia forno troviĝis ankaŭ en Oslavany, en nuntempa strato *Na Popelu*. Pro tio oni Annan kromnomis Salpetristino (*Anna Ledkařka*). Oni ankoraŭ malmulte sciis signifon de karbo. Ekde la jaro 1813 ĉiuj brikfarejoj en ĉirkaŭaĵo kun radio unu milo de Brno uzis la karbon el distrikto Rosice-Oslavany.

Unu el infanoj de Anna Müllerová, filo **Jan Daniel Müller** (1793 – 1875) studis juron, sed post morto de sia patro li ĉesis studadon kaj gvidis entreprenon.

En la jaro 1816 apud Nová Ves entreprenanto **Christian Gotthelp Uhlig** fondis minejon Trojice – Ferdinand. En la jaro 1832 Anna Müllerová forpasis.

En la jaro 1848 en Zbýšov firmao Rahn fondis la plej profundan minejon en Aŭstro-Hungario. Ĝi estis profunda 338 m.

La 7-an de septembro 1848 oni eldonis leĝon pri neniigo de servuteco kaj servuta laboro.

En la regiono ekestis novaj ministaj entreprenoj, kiuj ekde la jaro 1858 uzadis **vaporajn maŝinojn**. *Detaloj pri la mineoj estas en Aldonoj 1 kaj 2 en fino de la teksto.*

Kultura nivelo de ministoj en la unua duono de la 19-a jarcento

Ministoj ofte trinkis prunbrandon, kiu mankis en neniuj loĝejoj. Multaj ministoj sciis nek legi nek skribi (krome subskriboj). Hejme ili havis kantaretojn de liturgiaj kantoj kaj ministajn kalendarojn – sed ili ne estis kutimitaj legi. Nur en la jaro 1855 en Zastávka (germane *Segen Gottes / Dia Beno*) oficisto **Antonín Honl** fondis bibliotekon, kie sabate vespere kaj dimanĉe ministoj kaj iliaj edzinoj povis pruntepreni librojn kaj ĵurnalojn. Ili pagis 10 krejcerojn por unu monato. Ankaŭ **Jan Löbl**, posteulo de Honl, la bibliotekon subtenis. Sed poste alvenis nova oficisto, germano, kiu bone sciis, ke laboristoj, kiuj legas, estas danĝeraj, ĉar ili pensas kaj scias pli multe ol bruto. Tial li la bibliotekon neniigis, ĉiuj libroj estis metitaj en skatoloj, kiuj poste malaperis.

Unu ministro observis sian filon, kiu klopodis kalkuli iun kalkulan problemon en matematika hejmlaboro. Li sian filon admonis: „Kial vi klopodas? Tuj tion ĉesu! Vi jam scias kalkuli al 40, neniam vi fariĝos doktoro kaj en minejo vi neniam gajnos pli multe ol 40 florinojn. Mi scias nek legi nek skribi, sed mi elkreskis.“

Minado post la jaro 1848

Ĝis la jaro 1855 oni transportis karbon en ĉaroj, sed en la jaroj 1852 – 1855 oni konstruis fervojan vojon el Brno al Zastávka. Post konstruado de fervoja vojo el Ostrava al Přerov en la jaro 1871 al karbo el karboekspluanta distrikto Rosice-Oslavany ekkonkuris pli kvalita karbo el Ostrava.

Ekde septembro 1913 minejo Kukla provizis elektrejon de Oslavany. En la jaroj 1911 – 1913 oni konstruis fervojon Kounice-Ivančice-Oslavany.

Akcidentoj en minejoj



„En minejo povas esti metano. Tio estas danĝera gaso, kiu povas eksplodi.“

Arnošt Chatrný (1906-1970), ministro, mia avo

La 8-an de junio 1860 en Padochov kaŭze de eksplodo en minejo Františka mortis 52 ministoj. En protokolo pri la akcidento ni povas legi pri malbonaj vivkondiĉoj de ministoj. Ekzemple **13-jara ministro Josef Šmarda** loĝis en vilaĝo Zbraslav kaj ĉiutage piede iradis al laboro 3 horojn tien (15 km) kaj 3 horojn reen (15 km). En minejo oni laboris 12 horojn. Tio signifas, ke tiu knabo havis nur 6 horojn por ripozo, manĝado kaj dormado.

La 21-an de aŭgusto 1871 en Zbýšov en minejo Antonín 5 ministoj mortis kaj 25 ministoj estis brulvunditaj.

La 27-an de aprilo 1872 en Zbýšov en minejo Anna 2 ministoj mortis.

La 21-an de julio 1875 en Zbýšov en minejo Antonín 14 ministoj mortis.

Danĝeraj estis inundoj - 1889 en minejo Julius (Zastávka).

La 21-an de marto 1921 en Oslavany en minejo Kukla 26 ministoj mortis.

Ministaj strikoj

Salajroj de ministoj estis malaltaj, la plej malaltaj ministaj salajroj en tuta Aŭstro-Hungario! Nur en la jaro 1919 ekestis 8-hora laboraŭro. Pro tio ministoj strikis en la jaroj 1875, 1889, 1898, 1907, 1917, 1920, 1923, 1926, 1928 kaj plej longe **3,5 monato vintre 1932-1933**. Post la striko oni reen en laboran postenon akceptis nur 74,5 % da ministoj.



„Ministoj soldatiĝis lastaj, nur en la jaro 1916, ĉar patrujo bezonis karbon. Sub tero estis varmege, sed vintre tre frostis, tial ministoj revenante devis porti virinajn lanajn tukegojn. En minejo ministoj ne povis lavi sin, ĉar tiam neniuj duŝoj ekzistis. Post laboro ili revenadis hejmen malpuraj. Panjo preparis varman akvon kaj nur hejme mia paĉjo povis lavi sin.”

„Kiam estis striko, ministoj ekribelis. Sed kiam ĝendarmoj proksimiĝis, la ministoj ĵetis siajn pafilojn en riveron. Mia paĉjo kuris hejmen, vestita rapide enlitiĝis kaj mia panjo devis al ĝendarmoj svori, ke li estis malsana, kaj pro tio li ne povis labori. Alie li perdus sian laboron.”

Julie Chatrná (1910-2005), mia avino

Ĝis la jaro 1901 ĉiuj ŝaktoturoj estis lignaj. En minejoj laboris ankaŭ ĉevaloj (1932 en minejo Kukla, 1945 en minejo Antonín).

En la jaro 1935 estis fondita Mineja Kompanio Dia Amo de Rosice, kies rezidejo situis en Zastávka u Brna.



„Mia onklo Jozefo estis ministro, same kiel ĉiuj aliaj viroj en nia familio. Li estis ĝoja homo, kiu havis grandan sencon de humuro kaj senĉese pripensis iujn ŝercojn. Mi estis knabineto. Li donis al mi panon kun kazeo dirante: “Tion al vi sendas minejaj koboldoj.”

Božena Fischerová (1932-2011), mia patrino

Germana okupado (1939 – 1945)

Dum okupado germanoj konfiskis ĉiujn minejojn kaj alportis tien germanajn ministajn fakulojn.

En la jaroj 1943 en Oslavany apud minejo Kukla okupantoj kreis hebrean laboran barakaron, en kiun ili sendis hebreojn el miksitaj geedziĝoj. La unua grupo de hebreoj amikiĝis kun lokaj laboristoj, tial germanoj ilin sendis reen en Terezín. La dua grupo restis en Oslavany ĝis fino de milito, sed hebreoj estis de lokuloj separitaj. La barakaro kaj laborloko estis ĉirkaŭitaj per pikdrato.

En minejo Kukla oni renovigis laboron jam la 5-an de majo 1945. En minejo laboris ankaŭ germanaj militkaptitoj kaj germanaj civiluloj.

En la jaro 1945 en Zastávka germanoj preskaŭ neniigis minejon Julius. Ili uzis fosforajn bombojn. En januaro 1946 oni en Julius denove eklaboris.

Dum kaj post socialismo

Ministoj gajnis bonajn salajrojn. En Oslavany, Zbýšov kaj Zastávka oni konstruis ministajn plansetlejojn. Ministoj povis travivi libertempojn en banlokoj Karlova Studánka kaj Luhačovice aŭ ĉe Nigra kaj Adria Maroj. Ili emeritiĝis kvin jaroj pli baldaŭ ol aliaj alaboristoj. Sed en regiono estis multe da parte aŭ plene handikapitaj pensiuloj.

Minejo Jindřich II en Zbýšov fariĝis **la plej profunda minejo en Ĉeĥoslovakio kaj Eŭropo (1 428 m).**



„Minejo en Zastávka estis tre profunda. Tie estis tiel varme, ke ministoj devis labori nudaj. Dum laboro ili perdis multe da fluidaĵoj. Kiam ili finis laboron, gastejestro kromnomata Kocór (Virrato) ilin jam atendis pretigante plenajn duonlitrajn glasojn da biero. Atendante buson ministoj trinkis po 4-5 glasojn da biero. Ili trinkis tiel rapide, ke ne glutis, nur rekte enverŝis la bieron en siajn stomakojn. Ili rapide pagis kaj perbuse iris hejmen, en ĉirkaŭajn vilaĝojn.”

Oldřich Fischer (1929-2009), mia patro

Ĉefaj aĉetantoj de karbo estis elektrejo en Oslavany, termocentralo en Brno, feraj minejoj en Ejpvovice kaj Mníšek pod Brdy, Svit Gottwaldov.

Oni fabrikis koakson jam en la jaro 1820. En la jaro 1902 ekzistis jam 87 koaksofarejoj. En la jaro 1955 oni finis fabrikadon de koakso en tuta distrikto.

En la jaro 1876 en minejo Julius oni ekfabrikis karbobriketoj el karba polvo kaj 6 % da rezino. Oni fabrikis 55 milojn da tunoj per jaro. La fabrikado finis en la jaro 1959.

Oni fabrikis karbon polvon (sub 0,1 mm). En la jaro 1969 oni fabrikis 8,3 milojn da tunoj por gumfarejoj. La fabrikado finis en la jaro 1991.

La 18-an de februaro 1992 en tuta distrikto finis karboekspluatado, kiam el minejo Antonín oni ekspluatis lastan ĉaron da ŝtonkarbo.

Poeto kaj verkisto Mirek Elpl



Mirek Elpl, propranome Eduard Elpl (la 16-an de novembro 1905 en Líšeň – la 7-an de februaro 1960 en Brno). Liaj antaŭuloj habis nobelan nomon *Elbel*.

Lia patro Eduard Elpl (1871 – 1959) estis instruisto kaj verkisto kaj lia onklo František Elpl (1870 – 1904) estis loka folkloristo kaj dentisto en Líšeň.

Post fino de mezlerneja studado (1923) Mirek Elpl ĝis la jaro 1931 studis en Minista Altlernejo en Příbram (1923 – 1934). Jam dum studado li eldonis poemarojn *Domova hlas* (Voĉo de Hejmo, 1928), *Jinovatka* (Prujno, 1929) kaj *Bílý statek* (Blanka Bieno, 1929).

Li verkis rakonton pri socialaj problemoj de ministoj, tial li ne povis trovi laboron. Tiam la respubliko suferis de krizo kaj pro tio juna inĝeniero, kiu interesiĝis pri socialaj problemoj, ne kapablis trovi fakan postenon kaj en la jaroj 1932 – 1938 provizore laboris en ŝparbanka oficisto.

En la jaro 1932 li edziĝis kun **Anna Rosenzweigová**.

Kun helpo de inĝ-**o Josef Végső** li ĉeĥigis poemojn de hungara poeto Ady Endre (1935): *Krev a zlato* (Sango kaj Oro).

En romano *Marco Polo* (1937) aŭtoro priskribas vivon de fama vojaĝanto post lia reveno en Venecion. Marco Polo (1254 – 1324) en la jaroj 1271 – 1292 kun sia patro kaj onklo vojaĝis en Mongolion kaj Ĉinion. Marco Polo post sia reveno rakontis al venecianoj pri regno de mongola ĥano Kublaj. Li volis konvinki la venecianojn por merkado kun tiu granda lando, sed liaj samlandanoj al li ne kredis kaj mokis lin. En marbatalo kontraŭ ĝenovanoj Marco Polo estis kaptita kaj en malliberejo (1298 – 1299) diktis al sia sammalliberulo Rustichello da Pisa sian romanon pri regno de Kublaj. Rustichello verkis france la libron *Livres des merveilles du monde* (Libro pri Mirakloj de Mondo), kiu en Italio estis eldonita kiel fama Milliono.

En karboekspluanta distrikto Rosice-Oslavany li eklaboris en la jaro 1938.

Libro *Objevil jsem nebe* (Mi Malkovris Ĉielon, 1938) estas dediĉita al astronomoj Giordano Bruno (1550 – 1600), Tycho de Brahe (1546 – 1601), Jan Kepler (1576 – 1630), Galileo Galilei (1564 - 1642) kaj pioniero de interplanedaj flugoj Konstantin Eduardoviĉ Ciolkovskij (1857 - 1935). En la jaro 1959 oni la libron reldonis sub la nomo *Hvězdy nehasnou v popelu* (Steloj Ne Estingiĝas en Cindro).

Dum nazia okupado li laboris en minejo Kukla en Oslavany.

Lia edzino Anna Elplová estis hebreino kaj en la jaro 1943 laboris en hebreja labora barakaro apud minejo Kukla. En la jaro 1944 oni ŝin transportis en Hagibor (Prago) kaj de tie en februaro 1945 en barakaron Terezín (norda Bohemio). Ŝi transvivis.

En la jaro 1944 oni Mirekon malliberigis en Studenthejmo Kounic en Brno kaj poste transportis en koncentrejon Klettendorf (nuntempe en Vroclavo-Klecina). En komenco de la jaro 1945 germanoj la koncentrejon neniigis, ĉar soveta Ruĝa Armeo proksimiĝis. Mirek piede revenis el Pollando en Ivančice. Tie oni lin kuracis, sed baldaŭ al li minacis la dua transporto en koncentrejon. Brava kuracisto savis lin. Li kun falsa diagnozo (tuberkulozo) lin sendis en kuracejon en Jevíčko, kie Mirek Epl ĝisvivis finon de milito. Li verkis lirikan libron *Jaro v Jevíčku* (Printempo en Jevíčko, 1946).

En la jaroj 1945 – 1953 Mirek Elpl estis direktoro de minejo Julius (Zastávka u Brna) kaj poste li laboris en karboekspluanta direktorejo en Rosice. Lia lasta libro estas rakontaro *Černí andělé* (Nigraj Anĝeloj, 1960).

Li kaj lia edzino estas entombigitaj en Centra Tombejo en Brno.

Urbeto Líšeň estis aldonita al Brno en la jaro 1944. Nuntempe en Brno-Líšeň unu strato havas nomon *Elplova* por honoro de Mirek Elpl kaj lia patro Eduard.

Rekomendita literaturo

ELPL, M. 1936: Vteřina. Sedm básní. 1-a eld., Brno, Moravské kolo spisovatelů, 21 paĝo.

ELPL, M. 1945: Česká rapsodie. 1-a eld., Moravská Ostrava/Prago, Nakladatelství Josef Lukášik, 65 paĝoj.

ELPL, M. 1946: Jaro v Jevíčku. 1-a eld., Brno, Družstvo Moravského kola spisovatelů, 79 paĝoj.

ELPL, M. 1959: Hvězdy nehasnou v popelu. 1-a eld., Brno, Krajské nakladatelství v Brně, 230 paĝoj.

ELPL, M. 1960: Černí andělé. 1-a eld., Prago, Československý spisovatel, 132 paĝoj.

ELPL, M. 1969: Důl u Veselého rytířstva. Kronika ze starých časů. 1-a eld., Brno, Blok, 326 paĝoj.

- ELPL, M. 1973: Nevěsta pod kamenem. 1-a eld., Brno, Blok, 140 paĝoj.
- ELPL, M. 1975: Marco Polo. 3-a eld., Brno, Blok, 224 paĝoj.
- ELPL, M. & MALÝ, L. 1966: Rosicko-oslavanským uhelným revírem. 1-a eld., Brno, Okresní pedagogické středisko Brno-venkov, 101 paĝo.
- ENDRE, A. 1936: Krev a zlato. Přebásnil Mirek Elpl. 2-a eld., Brno, Moravské kolo spisovatelů, 39 paĝoj.
- HORA-HOŘEJŠ, P. 1996: Toulky českou minulostí, 5-a volumo, 1-a eld., Prago, Baronet kaj Via Facti, 230 paĝoj.
- HORA-HOŘEJŠ, P. 1997: Toulky českou minulostí, 6-a volumo, 1-a eld., Prago, Baronet kaj Via Facti, 230 paĝoj.
- HORA-HOŘEJŠ, P. 1998: Toulky českou minulostí, 7-a volumo, 1-a eld., Prago, Baronet, 222 paĝoj.
- KUKALOVÁ, J. 1963: To the taxonomy of Palaeodictyoptera (Insecta). Věstník Ústředního ústavu geologického, 38: 197-200.
- KUKALOVÁ, J. 1964: Review of the Calvertillidae, with description of the new genus from permian strata of Moravia (Palaeodictyoptera). Psyche, 71: 153-168.
- MACKOVÁ, I. 1978: Literární pozůstalost, Mirek Elpl (1905 – 1960). 1-a eld., Prago, Literární archiv Památníku národního písemnictví, 14 paĝoj.
- MATĚJ, M., KLÁT, J., PLCHOVÁ, J. & KYSELÁK, J. 2013: Cultural monuments of the Rosice-Oslavany Industrial Area. 1-a eld., Ostrava, Národní památkový ústav kaj Územní odborné pracoviště, 207 paĝoj.
- PLCHOVÁ, J. 1999: Rosicko-oslavanský uhelný revír. 1-a eld., Oslavany, Urbo Oslavany, 62 paĝoj.
- SMUTNÁ, K. & BERGEROVÁ, R. 1982: Rosicko-oslavanská stávka 1932 – 1933. Výběr dokumentů jihomoravských archivů. 1-a eld., Brno, 7 paĝoj + 27 aldonoj.
- TRANTINA, V. 2005: Spisovatel Mirek Elpl a jeho vztah k Příbrami.
https://slon.diamo.cz/hpvt/2005/tradice/T_15.htm

Aldono 1**Minado de ŝtonkarbo [t / jaro] en karboekspluanta distrikto Rosice-Oslavany**

Jaro	t	Jaro	t
1947	449 320	1970	607 770
1948	496 890	1971	591 690
1949	510 000	1972	515 524
1950	524 000	1973	462 720
1951	560 380	1974	418 020
1952	588 020	1975	387 206
1953	596 520	1976	386 225
1954	588 870	1977	361 300
1955	616 300	1978	335 476
1956	620 110	1979	289 450
1957	630 325	1980	221 700
1958	643 764	1981	239 600
1959	659 548	1982	238 300
1960	680 493	1983	243 000
1961	703 764	1984	243 600
1962	731 049	1985	241 900
1963	751 668	1986	237 900
1964	718 936	1987	238 200
1965	647 296	1988	237 000
1966	676 384	1989	196 250
1967	617 826	1990	140 850
1968	604 657	1991	90 345
1969	601 453	1992	4 870

Aldono 2

Minejoj de ŝtonkarbo en karboekspluanta distrikto Rosice-Oslavany

Minejo	Kadaŝtro	Jaroj de ekspluado
Anna	Oslavany, poste Zbýšov	ĉirkaŭ la jaro 1800, poste 1830-1872, 1944-1967
Anna	Babice	netrovita
Antonín	Zbýšov	1846-1992
Barbora	Oslavany-Zbýšov	1782-1854 kun paŭzoj
Bohrlochsacht	Padochov	1850 eniraj kaj aerumaj koridoroj por Františka
Dědičná	Oslavany	ĉirkaŭ la jaro 1800
Dědičná	Zastávka	1813
Ferdinand	Babice	1856-1955
Františka	Padochov	1848-1913-1973
František-Alexandr	Zbýšov-Majrov	ĉirkaŭ la jaro 1800
Gegentrum	Zastávka	1813-1889
Göppel	apud Zastávka	ĉirkaŭ la jaro 1800
Hanělka	Babice	1934-1943
Havírna	Oslavany	ĉirkaŭ la jaro 1785
Herring	Zastávka	1852-1887
Christofi	Oslavany-Havírna	antaŭ la jaro 1800
Charlota	Oslavany	ĉirkaŭ la jaro 1800
Jánský	Oslavany	antaŭ la jaro 1800
Jindřich I	Zbýšov-Kratochvilka	1854-1937
Jindřich II	Zbýšov	1969-1991
Jindřich-Antonín	Zbýšov-Majrov	ĉirkaŭ la jaro 1800
Jiří	apud Zastávka	ĉirkaŭ la jaro 1800
Josef	Zastávka	1938-1972
Karoli	Zbýšov	fermita en fino de la 19-a jarcento
Kateřinská	Zbýšov	1840-1859
Kukla-V. Nosek	Oslavany	1865-1973
Mašinka-Müller	Oslavany	1850-1873 oni ankoraŭ ekspluatis, poste nekonata sorto
Nová-Julius	Zastávka	1877-1967
Okrouhlík-Pionýr	Zastávka	1801-1870, 1949-1956
Plantáže	Babice	ĉirkaŭ la jaro 1800
Poustka	Zbýšov	1820 ĝis ĉirkaŭ 1860
Xaverská	Oslavany	fermita en fino de la 19-a jarcento
Silniční	Zastávka	1836-1878
Simson	Zbýšov	1848-1925

Svatotrojický Ferdinand	Nová Ves	1850 kun paŕžo ĝis 1860
Štěstí	apud Zastávka	ĉirkaŭ la jaro 1800
Terezínská	Zbýšov	1834 ĉirkaŭ ĝis 1850
Theodor	Zbýšov-Majrov	ĉirkaŭ la jaro 1860
Větérka	Zbýšov	ĉirkaŭ la jaro 1800.